# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 11 Novembro, 2015

*Kara Leganto, oktobra kunsido de nia E-kolektivo jam restis en historio: subite venis 4 novaj personoj, tri el kiuj jam estis konvinkitaj E-istoj. Pri la kunsido raportas nia sekretariino Tina Seastrom, apuda foto estis farita sur la post-rikolta Ŝuista Placo.*

*Kiel memorigo: sekvanda novembra kunsido estos la lasta antaŭ la Zamenhofa Tago, informon pri kiu vi trovos malsupre.*


*Agrablan legadon. Ĝis la! –La Redakcio*



## Oktobra Kunsido *de Tina Seastrom, E-Societa Sekretariino*

Ni havis 4 (kvar!) novajn vizitantojn, kiuj, espereble enfluos nian E-kolektivon, ĝi estas ĝojiga flanko de nia kunveno, sed mi volas raporti pri pli malĝojan: bedaŭrinde baldaŭ nin forlasos aktivega nia samideano, fervora E-isto Marko Ŝafrot. Li dekomence translokiĝos al alia usona ŝtato kaj poste iros transmaren – en Francion, kie li, sendube, plifortigos sufiĉe fortan francan E-movadon. Marko, ni kune ekdeziros al vi feliĉan E-sorton, sed post la Zamenhofa tago.

Tri el kvar novaj vizitantoj estas diversnivelaj E-istoj, kiuj malsupre prezentas sin, kaj unu, mia amiko, estas interesanto pri la IL. Do, jen freŝbakitaj gesamideanoj parolas pri sia E-vojo. Legu atente.



**Hiram Crespo** estas esperantisto ekde la fruaj 1990-aj. Liaj aliaj lingvoj estas la angla, la hispana, kaj iom da la franca, kiun li studis universitate. Li naskiĝis en Novjorko kaj kreskis en Puerto Riko. Li ne nur ŝatas lerni lingvojn, sed ankaŭ filozofion, geografion kaj aliajn stud-objektojn.

Hiram estas ankaŭ blogisto kaj verkisto kaj kreis la Societon de Amikoj de Epikuro (societyofepicurus.com) por disigi la filozofian tradicion, kiun li amas. Li verkis la libron "Tending the Epicurean Garden" (Humanist Press, angle kaj hispane) por enkonduki al siaj legantoj la tradicion, Li tradukis hispane la libron "Kelkaj Tagoj en Ateno" (A Few Days in Athens), kiu estas romano instruanta l' epikuranismon, verkita de Frances Wright kaj dividita en 18 diskursoj. La lasta verkaĵo, kiun li aŭtoris, estas "Epítome", ĝi enhavas skribaĵojn antikvajn kaj modernajn pri la historio kaj la instrumetodoj de la Skolestroj epikuraj.

La kolekto de Epitomo enhavas pensojn pri la skribaĵoj de filozofo Filodemo de Gadaro, kies pergamenoj estis bruligitaj en la jaro 79 de la Komuna Epoko dum erupcio de volkano, kiu detruis ankaŭ Pompejon, en la urbeto de Herkulano, Italio. La enhavo de la pergamenoj de Herkulano estas ege multekostaj kaj malfacile troveblaj en ĉiu lingvo, do ĉi tiu laboro por farigi ilin haveblaj por la nuna homaro, angle kaj hispane, tre gravas. Hiram nun faras la tradukon de "Epitomo" al Esperanto, por ke samideanoj pli bone konu la tradicion filozofian, kiun li ŝategas.



Saluton, mia nomo estas **Dela**. Mi estas E-komencantino, mi parolas ankaŭ anglan, francan, hispanan kaj lernaas aliajn lingvojn. Mi ŝatas lerni lingvojn kaj renkonti bonajn homojn, kiuj parolas Esperanton. Mi laboras kaj loĝas en Ŝikago.



Mi estas **Hanso Becklin** – dudek-tri-jara komencanta esperantisto. Mi naskiĝis en Viskonsino kaj loĝis tie ĝis la jaro 2010-a. En 2014 mi diplomiĝis en "Lutera Kolegion" (en Iovao) pri historio. Nun mi studas por diplomiĝi pri teologio ĉe luterana seminario en Ŝikago. Mi loĝas kun mia edzino en ŝikaga najbarejo "Hyde Park."


Mi esperantiĝis pasint-julie, ĉar mi tre ŝatas lingvojn, sed neniam flue parolis iun. Mi esperis, ke Esperanto estis pli facila ol hispana aŭ japana, la du parolaj lingvoj, lernataj de mi. Ĉi tio estas vera! Esperanto estas la plej facila lingvo, kiun mi iam lernis! Esperanto estas pli facila ol helena aŭ aramea (hebrea), ambaŭ estas bibliaj teologiaj lingvoj, kiujn mi scias.

# Ternopil al Lenino: “Adiaŭ!”

Antaŭ 25 jaroj, en Aŭgusto de 1995 mia gepatra urbo Ternopilo adiaŭis estron de la tutmonda proletaro, gvidanton de la plej unua (malsukcesa) laborista lando, pri kiu nun revas socialisto Barako Obamo en Usono, Vladimiron Ulanov-on. Tiam mi laboris por la Tutukrainia televidneto No. 5, mi eĉ estris sindikatan organizaĵon de kompanio, kiu unuigis 350 kunlaboristoj el 4 provincoj de Ukrainio: de Kamjanec-Podolia (sude) ĝis la Kovelo (norde). En tiu tempo miaj kunlaboristoj diversnivele rilatis al Sendependeco: de negative akcepto kaj ĝis la (pozitiva) – “Ukrainio estas super ĉio!”

Sed tiu aŭgusta posttagmezo restos en mia memoro por ĉiam: laŭ decido de la urba konsilio Ternopilo planis adiaŭe “svingi per mano” al la ĉefo de mizeruloj (kiel skribis mia samnomulo Viktoro Hugo). Mi, kune kun miaj samlfborantoj, venis al la placo de Lenino je la pr. 3-a posttagmeze, kie jam kolektiĝis miloj da urbanoj atendantaj la miraklon, nome – “la miraklon”. Neniu ĝis la lasta momento kredis, ke mortiginto de la ukraina popolo foriros al forgeseco sur la tero, kie neniam paŝis liaj piedoj portantaj bastoŝuojn, sed kie oni starigis al li milojn da idoloj. Fakto.

Kontraŭe al la noktoj nuntempaj adiaŭoj kun lenino, en Ternopilo la tuta ceremonio trapasis eŭropece: sen vandalismo, barbareco, kulture, kun la sekvanta festado en preskaŭ ĉiuj restoracioj-drinkejoj de la urbo.




Dank’ al tiu ĉi evento mi dum la longa tempo agis kiel internacia E-ĵurnalisto, raportanta pri Ukrainio al la sendependa E-revuo “MONATO”. Mia raporto aperis en la novembra n-ro (1990) de menciita eldonaĵo kaj la foto ornamis titolpaĝon: manoj de mia samurbanoj strebas forpreni literojn de malbenita familnomo ЛЕНІН (Lenino en la ukraina). En artikolo-raporto mi rakontis pri historio kaj planoj de simila malmuntado en eksa Sovetio: Kovno (Litovio), Tbiliso (Kartvelio). Mian kopion de la numero mi iam donacis al muzeo de Ternopilo kaj la tuta stoko jam delonge elĉerpiĝis en Belgio, sed multjara redaktoro de “Monato” Paŭl Peeraerts dum la 100-s UK en Lillo promesis sendi al mi foton de lia kopio kaj afable plen umis promeson (vidu apudan foton). Estimata s-no Paŭl, dankon! *–Araneo*

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave.
Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon! Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276

**24an de Novembro, 7-8:30pt** – Hiram parolos pri la Epikuranismo.

**13an de Decembro, 12-4pt** – Zamenhofa Tago en Randolfa Turo.

# Lokejo de Sekvantaj Kunsidoj

– Novembra kunsido okazos laŭ la adreso: **1350 N. Wells St., Ŝikago, IL**. Bonvenon! Apudas stacioj: Sedgwick (Bruna linio) kaj Clark/Division (Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro laŭ la numero (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).

– Zamenhofa Tago 2015 okazos en mla 42-etaĝa konstruaĵo Randolfa Turo, lokanta laŭ adreso 188 W. Randolph St. Ni kolektiĝos en klubejo sur la 25-a nivelo kun pitoreska pejzaĝo. Notu en via kalendaro daton de 13a de Decembro.



